

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 27 n-ro 5/6(121/122) 30.12.1976.
--	--

LA VALORO DE LA GEOGRAFIAJ SUFIKSOJ

(MANUEL GOMES, SILVEIRA - PICO, ACORES, PORTUGALIO)

PREZENTO

Estas jenaj geografiaj sufiksoj:
 - "-ujo", "-io" por nomi landon kaj
 - "-ano" por nomi ĝian enloĝanton

Prezentante tiun ĉi studon, estis mia sincera volo evidenti, ke la "Problemo" pri la Geografiaj Propraj Nomoj en Esperanto simple ne estas "problemo". Ĝi jame estas solvita per la uzo mem, eĉ pro tio, ke ĝi estas tre divers-aspekta, *laŭ la persono* (propraj kvalitoj), *laŭ la epoko* (en la sama persono) kaj *laŭ la verkoj* (meritoj, celoj, efikoj).

Estas nur necese eltrovi verajn kampojn de la uzado de ĉiu sufikso, kun ĝiaj kvalitoj, por ke ĉiu aparta sistemo aŭ skolo ne pretendu (kvankam ne eble) okupi la kampojn de aliaj.

A) LA KAMPO DE UZADO DE "-UJO" KOMPARE KUN TIU DE "-IO"

Por nomi landon (kiel tuton) Esperanto havas sian sufikson "-ujo" kaj ankaŭ la finajn (kvazaŭ)sufikson "-io". Tia fakto ebligas, ke multaj el ni iafoje uzas unu kaj aliafoje uzas la alian. Tamen, eĉ pro tio mem konvenas scii pri la adekvataj sencoj de ĉiu sufikso aparte. Do oni vidu:

- 1) Pri la sencoj, kiujn tiuj du sufiksoj eventuale havas en aliaj uzadoj ekster la geografia kampo


a) *Pri "-ujo"*: Pro la baza senco de la sufikso "-ujo" (=vazo), oni estas devigata kompreni, ke en la geografia nomigado la senco "lando" estas kvazaŭ: "la granda entenujo"

havanta koncernan "ion" (tiuokaze, la koncernan genton). Tia sence ĝi do emas alcentrigi la entenatan objekton, nome, ties popolon.

b) *Pri "-io"*: Aliflanke, la sufikseca finaĵo "io", ekde antikve vaste uzata precize en la greka kaj latina pralingvoj, jam tie ĝi prezentiĝas kun la proksimuma senco de: "kampo de disvastigado de "io" komprenata en la radikalo el kiu, tiu finaĵo estas parto. Tiun fenomenon oni trovas kvazaŭ neeviteble ne nur en la aplikado je la Geografiaj Propraj Nomoj, sed eĉ kaj precipe ĉe Scienco kaj Arto.

c) Grafike prezentante la ĉi-suprajn ideojn, oni povas uzi cirklon eble sam-ampleksan, kie la interna ideo malsamas nur pro la senco - direkto.

Jen laŭ la bazaj sencoj:



- 2) *Pri la ortografi-fonetikaj analogiaj sencoj de tiuj du sufiksoj kompare kun fonetikaj similecoj al aliaj vort(er)oj de la Lingvo*

Fakte oni konstatas iajn sencajn kaj formajn analogiojn koncerne aliajn vort(er)ojn de la Lingvo, kiuj, kvankam okazecaj, foje nin pensigas pri la intuo ĉe ilia kreiĝo, rezulte de vole-nevole neevitebla konverĝo de ideoj. Jen:

a) *La senco-forma analogio inter "-ujo" kaj "-io"*

Komparante sub la fonetika interrilato la du sufiksojn "-ujo" kaj "-io" oni trovas, ke inter unu kaj la alia, la Lingvo prezentas al ni la komunan sufikson "-ejo", ankaŭ (sub alia aspekto) signifanta "lokon", kie la fonetika aspekto grade modifiĝas de unu ĝis la alia, samtempe ke la baza signifo same elastiĝas. Kaj kvankam tia fakto estas nur simpla koincido, ĝi tamen ne havas forten eviti la efikon. Jen:

"-ujo" (=vazo) (limigita)	"-ejo" (=loko) (apartaĵa)	"-io" (kampo de disvastigado)
------------------------------	------------------------------	----------------------------------

b) *La senco-forma analogio de "-ujo" al "-ulo"*:

Ankaŭ sub alia aspekto, sed eĉ kun pli efika rezulto, oni povas kompari, same fonetike kaj sence, la formon "-ujo" (lando) kun la sufikso "-ulo", maniere ke la sufikso "-ujo" ŝajne prezentiĝas kiel sinkopa rezulto de la kombino de "-ulo" (homo) kun "-ejo" (loko), tiel

$$"u(l)/o" + "(e)j/o" = "uj/o"$$

Tiu certe okazeca parenceto de tiuj du sufiksoj nin indikas ian specon de intue kreiga etimologieco, el kio facile sentiĝas la etnologia senco de la sufikso.

c) *Analogioj koncerne nur al la sufikseca finaĵo "-io"*

Estas eksterdube, ke ĉu pli ĉu malpli efike, kiam ĉe iuj Propraj Nomoj oni uzas la Geografian finaĵon ... "io", oni ne povas eviti la penson pri iu el la sencoj trovataj en la jenaj vortoj: "teritorio, imperio, dominio, kolonio, nacio, patrujo, ... eĉ aĉtarkio, parokio... legacio..." kvazaŭ la finaĵo "-io" en la Geografiaj Propraj Nomoj - per si nur - reprezentus tiajn komunajn sencojn adicie al la radikala lokindika nocio de la Propra Nomo.

3) *Praktika rezulto de la "diverĝa senco" de la land-signifaj sufiksoj*

El la pluraj komparoj prenitaj el realecaj konstatoj, sentataj en la intuaj uzoj, kaj ankoraŭ pro aliaj faktoj, sekve prezentataj, oni venas al la jenaj koncernaj konceptoj pri la veraj sencoj de ĉiu el tiuj du sufiksoj aparte:

a) *La uzo-senco de "-ujo"*: Adiciante al la fakte regula normo, ke tiu sufikso montras la landon loĝatan de koncerna popolo, kiun la radikalo geografiece indikas, oni regressive same akiras la regulon, ke la Nomo uzanta tiun sufikson estas gento-senca kaj pro tio ia-maniere indikanta la "-ulon" de tiu lando. Tiu fakto estas ankoraŭ derive alia, per kiu oni senpere konkludas, ke la sufikso estas baze kaj proprasence "etnologia sufikso" en la geografia nomigado.

b) *La uzo-senco de "-io"*: (ĉu vere sufikseca ĉu simpla finaĵa vortero).

Ne nur pro la jam notita senc-identeco kun la pluraj geografiaj komunaj vortoj, kiujn ĝi implice indikas ĉe la Propra Nomo, sed tre pli efike pro la sam-origina senc-ampleksiga fakto mem, herede trovata precize ĉe granda kvanto de Propraj Nomoj, oni ja trovas en tiu procedo la naturan eblon por la speciala "geografi-politika" nomigado de la lando (areo) al kiu la Nomo rilatas.

c) Nur dirende, ke el la respektivaj konstatoj trovataj en la uzo-sencoj, oni kreive venas preciza-sence al la koncernaj senc-uzoj.

4) *Uzo-limigo de la du land-sencaj sufiksoj*

Estas evidente, ke ĉe ĉiu el tiuj du sufiksoj ekzistas la eblo nomigi ĉion pri kio ĝi adekvate sencas, kaj same la limigon ne povi nomigi tion pri kio ĝi fakte ne sencas.

Do pri ĉiu sufikso aparte:

a) *Limigo-senco de "-ujo"*: Pro la senco de la sufikso "-ujo", oni komprenas, ke ĝia eblo-kapablo nomigi la landon praktike ĉesas; kiam la radikala Nomo jam ne specife havas la sencon de "gento".

(Oni tamen konstatas kaj eble tio ne tro gravas, se erare aŭ aliefekte konsiderata, ke foje oni trovas la sufikson "-ujo" kun radikaloj al kiuj oni ne emas asocii la ideon de "gento", aŭ ĝin asociante, oni tamen kutimas ĝin esprimi per aldono de gento-senca rimedo, ekz. "Zairujo, Kastilujo"... formoj prese trovataj ia-loke..., kaj kies gentuloj estas Zair'anoj, Kastil'anoj. Tia fakto al ni montras ambaŭe la veran efiko-forton de la sufikso "-ujo" eĉ ekster ĝia kadro de normala uzo, kaj samenan neeviteblan neceson havi ties ideon en la nomigado, eĉ kiam la vortkondiĉoj ne tiom facile sin prezentas en la praktiko).

b) *Limigo-senco de la sufikseca finaĵo "-io"*: La amplekso de uzado de la sufikso "...io" estas pli vasta ol tiu de "-ujo", ĉar ĝi povas anstataŭi ĝin, paralele kovrante ĉiun ĝian uzon kaj plue ĝin transpasi en kampo de uzado, kie la antaŭa sufikso jam ne efikece domenas.

Tio, krom ĝia internaci-aspekta formo, estas ankaŭ unu el la faktoj, per kiu ĝi havas ĝenerale preferencan akcepton ĉe la Geografia nomigado, kiam en la nomigado oni nin esprimas pli malpli neŭtre, ekster la Etnologia-Geografia aspekto.

Tamen, spite tion, ankaŭ tiu ĉi sufikso havas siajn uzolimigojn, kiujn oni konsideros en la sekvantaj eksplikoj.

B) KAMPO DE UZADO DE LA IO-FORMAJ NOMOJ, KOMPARE KUN ILIAJ RADIKALOJ

1) La limigaj ebloj pri la kvazaŭ-sufikso "-io"

Oni konstatas, ke spite la fakte vere grandan reprezenteblecon de tiu ĉi sufikso en la Land-nomigado, ĝi tamen same estas limigita diversaspekte vere pli kondiĉigita pro la kutimoj de la (inter)naciaj ĝeneraligitaj uzoj de preskaŭ senlima kvanto de landnomaj formoj ol pro la propraj eblecoj de la sufikso mem.

2) La kreiva principo de la ŭcelaj io-formaj Nomoj en Esperanto

Spite al la heredaj modeloj de uzado, oni scias, ke en Esperanto oni ne simple uzas la (inter)naciajn formojn po-unume pruntitajn sed ankaŭ la kreivan fortan principon de la elementoj de tiuj modeloj, per kiuj la Lingvo celas pli konsekvence homogenan regulon. Tial, oni en Esperanto ĝenerale tre volonte preferas adapti la Nomojn laŭ la reguloj de iliaj konstruivaj elementoj ol simplece ilin adopti en iliaj po-unuumaj formoj.

Tre multaj el ni do iagrade emas aperigi la necesan kvanton de io-derivitaj formoj kun la celo kovri - se tio estus eble - per taŭgaj formoj la intuan sencon aparte trovatan en tiuspecaj Nomoj. Tiacele oni "pozitive" profitas aŭ akceptas ĉiujn kaj apartajn (inter)naciajn kutimojn, ĉu antikvajn ĉu modernajn foje nur propranacie aŭ alinacie uzatajn, kaj ankaŭ imite aldonas teorie kreitajn aliajn formojn, por ilin adapti al la dezirataj sencoidikoj.

Aliflanke tamen samprincipe kaj samcele oni zorge rezultigas "negativan" alian procedon, per kiu oni pretendas eviti la "io-formajn" Nomojn, konsiderataj ne konvenaj, kiam tiaj Nomoj ne havas eĉ minimume, la sencan de "lando, regiono"...

Sub tiuj regulo kaj kontraŭ-regulo, ne estas facile kompreneble, kiel el la nacia formo "Tôkyo" kaj "Warszawa" oni faris kaj aŭ akceptis la internaciajn formojn "Tokio", "Varsovio", dum el la naciaj "Canadian" kaj "Quenia" aŭ "Quenya", oni ne povis fari pli ol "Kanado, Kenio..." Same meritas atenton, ke oni diras "Meksikio, kiel Alĝerio" (el urbo) sed ĉe "Brasilia" inverse la lando cedis sian nomon al sia urbo!

3) Duobleco de formoj

La duobleco de formoj estas neevitebla ne nur el tio, ke ne ĉiuj sentas sin devigataj aprobi precize la formojn, kiujn aliaj prefere elektis, kaj kreas siaguste "io-formajn" Nomojn, sed ankaŭ pro tio, ke multaj el ni emas redukti la ŝajne derivitajn "io-finiĝantaj" Nomojn kun la celo regresive krei radikale simplajn aliajn formojn, el kiuj la finaĵo "io" aspektas kiel derivaĵo.

4) Praktika solvo de la duobleco de Formoj

Ĉar la ekzisto de duece aspektaj ebloj por nomigi "landon, regionon k.s...." ne estas pli ol konsekvenco de du (konkurencaj) principoj, tio do efikas por teoria nuanciga reguligo de la sencoj de la du sistemoj.

Teoria elprovo de la reguloj

Estas konstatabla fakto, ke por ĉiu aparta sistemo oni akiras teorion sed naturan regulon, ke la "ne-io-finiĝantaj" formoj estas la plej ĝenerale uzataj por la "fizika" (hidrografia, orografia...k.s.) aspekto, kaj ke la "io-finiĝantaj" formoj apartenas al la sistemo uzata por nomigi la (plej ofte) saman landon sed pli malpli sub "politika" aspekto. Rezulte oni do emas "unikece" konkludi, ke la uzo de "io" evidentigas, ke oni estas fronte al la "politika" senco de la lando, regiono, k.s., dum tio, ke la foresto de tiu sufikseca finaĵo unuavide al ni donas precipe la nocion de la "fizika" (nencese homrilata) aspekto.

5) Praktika inverseco de la (teoriaj) reguloj

Ĉar en la praktiko la uzo (ŝajne) ne ĉiam sekvas la teoriajn regulojn, oni devas atenti ankaŭ pri tio, ke:

- Ne malofte la "politika" etendo (areo) de la nomigata lando aŭ regiono, estas pli malpli samampleksa, kiel la sama "fizik-aspekta", kaj tiam (imite sub naciaj kutimoj) oni nature kaj eĉ evidente uzas ununuran formon por ĉiu el la du aspektoj, tiel:

aŭ oni uzas la "fizikan" formon por nomi ankaŭ la "politikan" nocion (vere korekta procedo pro ekonomia ŝparo de la pensiga streĉo) ekz. Angolo, Maroko,

aŭ inverse oni uzas la "politikan" formon por nomi la koncernan "fizikan" koncepton. (Neeviteble kiam ekzistas ununura formo por la sama Nomo), ekz. Kolombio, Ĉilio.

6) Subjektiva - Objektiva Efekto de la Inversa Uzo

Konsiderante la ĉi supran aferon sub la subjektiva-objektiva aspekto, oni sciu, ke:

a) Se oni emas uzi la formon kun "-io", la leganto (aŭdanto) tuj komprenas, ke la uzanto volas precizigi al ni, ke la nomigata land-Nomo devas esti komprenata en ĝia "politika" senco;

b) Se oni preferas uzi (la) "ne-io-finiĝantan" formon, tio indikas al ni, ke:

aŭ la uzanto vere pretendas mencii nur, aŭ precipe, la "fizikan" geografian aspekton,

aŭ eĉ subjektive konsiderante la "politikan" li ne pretendas doni al ĝi specialan distingon atenton en la "politika" geografia nomigado.

C) LA PLI MALPLI LIMIGITA KAMPO DE LA DEVIGA UZADO DE LA NOM-ELEMENTO "LANDO"

Krom kaj anstataŭ la du land-signifaj sufiksoj, kaj same pro pli malpli (inter)naciaj kutimoj, oni obeas al alia principo uzante, ĉu devige, ĉu laŭvole, la vorton "-lando".

1) Pri la deviga uzado de la Nom-elemento "lando"

Jen iuj tiel registritaj Nomoj, kiel Islando, Irlando, Nederlando, Groenlando, Nov-Zelando..., kie la unua elemento ĝenerale ne havas ian praktikan senco, sed servas kvazaŭ nur por "loke" cirkonstancigi la vorton "-lando". (Spite tion, oni - iuj inter ni - foje aŭdacas doni, tamen nur teorian, senco al - iuj el - tiuj Nom-elementoj. Ekz. en "Poŝatlaso" rilate "Ir'lando").

Tiu speco de Nomoj aperas en ĉiuj kampoj de uzado, ambaŭ politika kaj fizika, kaj eĉ por urboj, (ekz. Portland). Tiaŭze la vorto "-lando" funkcias kvazaŭ aĵinta parto de la Nomo simila al iu simpla tuto, kiel ekzemple aliaj Nom-elementoj "-ville, -stat, -burg, -grad, -stan, -pol, -sund, -ton", (kaj do, ankaŭ -land).

2) La ŭvola uzado de la Nomelemento "-lando"

Ĉe ĉiuj aliaj Nomoj, de kvanto ne facile limigebla, tiu Nomelemento povas facile esti anstataŭata per "-ujo" au "-io", el kio anstataŭ la kvazaŭ simpla tuto, rezultas facile konstatebla kunmetaĵo, ekz: "Svis'lando, Pol'lando, Finn'lando, Lap'lando, Franc'lando, Kongolando, Zululando, Zairlando..."

Tia uzo estas laŭvole limigita al iuj bone konataj landoj, sed ĝi ankaŭ estas ŝatata procedo ĉu en etnologia uzado, ĉu kiel emfaza maniero en politikaj kaj fizikaj geografiaj areoj ne tiom mondkonataj. (Multaj ekz-oj: Frislando, Zululando,...)

Simplavide tiu procedo ne grave malsimiliĝas el la antaŭa grupo, kiun oni klasigis sub "deviga uzado". Tiu fakto iamezure pravigas pritrakti la Nomojn de tiu grupo samprincipe, kiel tiuj ĉi nunaj.

(Noto: la enlaso de "o" en kongolando, Togolando..., havas alian pritrakton, ne sencorilatan sed simple teknikan en la vortfarado).

3) Apozicia uzo de la vorto "lando"

Kvankam ekstercele, estas menciinde la uzo de la vorto "lando" en esprimoj, kiel (la) Brazila lando.

En tia uzo la vorto "lando" efekte neniel malsimilas el aliaj esprimoj kiel: "teritorio, regiono, distrikto, ŝtato, komunumo, zono, departemento, kantono, insulo, monto, provinco",... (ekz. Grizona kantono = Grizonujo; Kipra insulo = Kipro). Tion citante oni nur komprenas, ke estas diversaj la akcesoraj geografiaj ebloj.

D) RESUME PRI LA STILO DE LA DIVERSAJ PROCEDOJ NOMIGI LANDON

Krom *la principo de senco-precizecoj*, per kiuj oni distingas nuancajn aspektojn de la land-nomigado, same ekzistas *la principo de varieco*, foje eĉ koste de ioma senco-neglekto, vere necese en stilo por eviti monotonecon.

Pro tio, *kaj tio mem estas regulo*, oni ĝenerale volas interrompi la entekstajn sinsekvojn de la samformaj Nomoj. Tio neniamaniere senvalidigas la regulojn pri la sencoj de ĉiu aparta formo, sed per tia procedo oni nur variigas eĉ kaj same *la sencan monotonecon*.

Fakte, (alia) elekto de la formo same respondas al (alia) koncerna senco. Alia senco ne esprimiĝas se koncerna formo ne estas uzata.

E) PRI LA SUFIKSO "-ANO" POR NOMI (GENTAN) INDIVIDUON

1) Fundamenta senco de la sufikso "-ano"

Simpladire la sufikso "-ano" (uzata kun radikalo signifi-fanta landon) indikas individuece la "(en)loĝanton" de tiu

lando. Ekz. "Boliviano, Venezuelano". Tio same okazas ĉe radikaloj indikantaj la tutan genton, ekz. "Izraelano, Izraeliano" (respektive: ano de popolo; enloĝanto).

(Krom tio - tamen eble erare konsiderate - oni foje vidas formojn kiel "svisano" k.s., kiuj vere produktas sian propran senbremsan efikon, tiel, kiel oni alisence jam notis pri la sufikso "-ujo" lastloke menciita).

2) Elasta senco de la sufikso "-ano":

En tiu sufikso oni komprene sentas, ke laŭ la radikalo al kiu ĝi estas ligata, ĝia senco iras *ekde la* provizore "etnologia kvalito" - do okupanta lokon pri kiu ne ekzistas gento-senca (-ulo-senca) nomo, vere efike kiam oni ĝin uzas lige al fizikaspektaj landnomoj, - *ĝis la* nura senco de "enloĝanto" (kunloĝanto) de lando (aŭ membro de koncerna gento), ĝenerale neeviteble, kiam oni uzas ĝin lige al la "politik-aspekta" Nomo de tiu lando.

Estas evidente, ke se la du aspektoj estas nomigitaj per unu nura sama formo la sufikso samtempe akumulas en si mem la du sencojn. Tamen teoriece la regulo ĉiam validas.

3) Pri la kreivaj eblecoj de la (inter) naciaj kutimoj

Citante ekzemplojn, kiel "Irano, Irako, Argentino,..." kie la Esperanta "fizika" formo ŝajne estas (laŭ iuj) la plej taŭga, kaj same citante "Sirio, Jordanio, Bolivio"... kie la "politika" aspekto pli bone koincidas kun la (inter)naciaj kutimoj, oni pertiaj kaj aliaj citaĵoj, sen pliaj konsideroj, facile komprenas, eĉ konstatas, ke ĉe la internacia nomigado oni ne facile havas kaj eĉ ne bezonas havi specialan formon por la tuta serio de landnomoj por el ili nomigi la "politikan" veron de tiu lando.

Sed, kiam oni konsideras la same (inter)naciajn formojn, kiel "iranian, iraquian, ... lat. brasiliensis, peruvianus"... oni fakte vidas kaŝitan interplekson de uzo (inter)nacia, el kiu aperas la bazo de la (teoria) ebleco por la "politikaj" formoj. Fakte la kombina sufikso "i/ano" (inter)nacie uzata pliriĉigas je "politika" eblo la serion de la Geografiaj Propraĵ Nomoj.

Vere la celo de Esperanto ne estas bremse neglekti eblajn ĝermojn de la internacieco, sed kontraŭe, profite el ili, ilin internaciigi ĝis la atingoj, kiujn la naciaj lingvoj siaeble nur parte, nur akcesore, sukcesis aŭ eĉ ne povis.

F) LA SUFIKSO "-ULO" (NE UZATA EN LA GEOGRAFIA NOMIGADO)

Estas interesa fakto, ke oni tute ne uzas tiun sufikson en la Geografia nomigado, spite tion, ke ĝi forte efikas, por ke el radikaloj landosencaj oni nomigu individuon.

Tian sencan oni tamen kontentige akiras el la sufikso "-ano" kun la (precipe fizikaspekta) landradikalo. Fakte la

naciaj kutimoj estas tiamaniere abundaj ĉi-rilate, ke oni simple imitas tian uzon, do ne sentante ian esprimvakuon.

Tamen, preskaŭ certe, ke la etnologoj utilece uzas aŭ uzos tiun sufikson en la kadro de ilia propra fako.

Intertempe oni notu, ke la gentosencaj radikaloj efike eksplikiĝas per la lokatributiva senco de la eksplicita formo substantive reprezentata kune kun la implica ideo de "-(ul)o", tiel: "ruso" = "Rus(a ul)o".

G) RESUMA KADRO DE LA ĜENERALAJ RILATOJ "GENTO/LANDO" EN LA PROCEZOJ DE NOMIGADO

Interrilatigante en la kompara kadro la bazan kvanton de la radikaloj esprimantaj la nociojn de "popolo" (individuo) kaj "lando" (tuto), kun la alia kvanto da nomoj, kies samaj nocioj estas inverse prenitaj pere de sufiksoj, oni alvenus al la jena grafiko:

Signifoj de:	ETNOLOGIA SENCO		POLITIKA(FIZIKA) SENSCO	
radikalo (simpla)	ano (individuo)	(ul)o	(i)o	lando (tuto)
sufiksigitaj Nomoj	lando (tuto)	ujo	ano	individuo(ano)

Konfirmaj eksplikoj:

- Ĉe "(ul)o" la radikalo donas la sencon de individuo de la gento atributive indikata en la radikalo mem.

- Ĉe "(i)o" la radikalo donas la sencon pri lando (ĉu sub "politika" ĉu sub "fizika" aspekto).

- En "ujo" la senco estas la rezulto de la (ul)o-senca (gento-senca) radikalo por nomi la koncernan landon.

- En "ano" la senco estas la rezulto de "(i)o"-senca (land-senca) radikalo por el ĝi nomigi la koncernan enloĝanton.

H) PARTIKULARAJ FIN-NOTOJ

1) Pri alies konsideroj

Lingvinte la artikolon estas kredeble la opinio, ke spite la diversajn koncentriĝajn ideo-aspektojn de la tuta temaro, venas la konkludo, ke oni ne decidis pri iu ajn metodo kaj, ke finfine, ĉio restos precize, kiel ĝis nun.

Tia konkludo estas vere la certa ĉar la celo ne estis alia ol, el de la intuo, eltrovi la pravecon de la sistemigitaj uzoj. Vere la Lingvo jam estas laŭcele "farita" kaj oni ne pretendas iamaniere modifi ĝian aspekton ŝanĝante la celvojn, sed nur konsciigi pri ties valoroj kaj ilin plicertigi laŭ la jam (de ĉiuj) elektitaj refoj.

2) Pri mia aparta starpunkto

Pro tio, ke ne estas eble plena neŭtreco pri tiom da eblecoj, ja elektitaj de la esperantistaro, mi devas eldiri, por tute min dekaŝi - ke mia pozicio estas plene, kiel montrite, laŭ disvolvo de la artikolo mem, nur ke la limigoj de: Eblecoj, Kampoj de Uzado, k.s., estu markitaj nur pro la senco mem de la Nom-elementoj kaj ne pro ortografiaj kutimoj, kvankam *la kutimo same estas regulo*, kiu povas efektive *limigi la "praktikan uzon" el la (foje) teoria bazo de senco*.

3) Ĝenerala konsilo:

Ne forstreki, ne anstataŭi ion; ne kondamni ian uzon; ne redukti aŭ ŝanĝi la kutimojn; ..sed simple ilin kompreni laŭ la kaŭzoj-celoj kiuj ilin diktis. Ĉio ne estas troa por varia riĉeco.

